Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

8a jarkolekto n-ro 3
marto 1988

FEN-INFORMATIEDAG VERSCHOVEN NAAR 28 MEI

In verband met andere, vrijwel gelijktijdige bijeenkomsten is de FEN-informatiedag 1988 verschoven van 19 maart naar 28 mei. Het thema van deze dag zal zijn "kiel ne perdi nov-Esperantistojn"; een kombinatie van de voorstellen gedaan na de suksesvolle informatiedag 1987. Iedereen kent het probleem wel: je hebt net een kursus gegeven, en acht van de tien kursisten zie je daarna nooit meer.
's Morgens zullen 4 personen hierover hun ideeën en meningen naar voren brengen, middels een korte lezing.
Ineke Emmelkamp vertelt hierover vanuit het KTP-perspektief, Hans ten Hagen representeert een regionale groep (Alkmaar), Désirée Derksen spreekt over jongerenbijeenkomsten, en namens FLE (kursusweekeinden) spreekt Bert de Wit.
Zeer interessant, m.n. voor kursusleiders en organisatoren van bijeenkomsten.
's Middags zal er gelegenheid zijn om met elkaar van gedachten te wisselen over deze thema's. Daarna volgt een korte evaluatie. De dag duurt van 11 tot 16 uur in het Esperanto-centrum in Den Haag, Riouwstraat 172, tram 1 en 9.

Aanmelden bij Gerard Gerritse, Valkeniersingel 43. 5241 JC Rosmalen, 04192-11496, voor 15 mei, door storting van ƒ 12,50 op giro 2315416 tnv. NGGE. Dit is inklusief koffie en lunch.

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

---

**ESTRARO**

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.

**KOMISIONOJ**

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

---



# P R O T O K O L O

de la estrarkunsido de sabato la 12-an de marto 1988 en Antverpeno

---

Ĉeestis : Jan Bovendeerd (JB), Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem (HV)

Senkulpigis : Alex Humet (AH), Edward Symoens (ES)

Prezidis ID, protokolis MC

Komenca horo : 10h30, fino : 12h

La antaŭa protokolo estas akceptita.

La estraro ĉefe pritraktis la preparon de la posttagmeza jarkunsido.

## I. S-ro Texier

La dato ŝanĝiĝis je la 7-a de majo. Ĉar unuflanke ID ne povas ĉeesti kaj ni mem devas pagi la kostojn kaj aliflanke la enhavo de tiaj kunvenoj ne multe valoras, ID informos s-ron Texier ke la belgoj ne partoprenos.

## II. 23-24-25.IX en Bruselo : Foiro "European Festival The World we choose"

Se la Brusela grupo kaj APE kunlaboras, ni havos standon tie. ID okupiĝos pri tio.

## III. Interna regularo

Jure, la listoj de la FEL-administrantoj devas ĉiujare aperi en la ŝtatgazeto. Tio kostas sufiĉe multe da mono ĉiun jaron.
Nun ke ni devas publikigi la ŝanĝojn de la statutoj (se la ĝenerala kunveno aprobas), ni povas kapti la okazon por pristudi la nunan regularon. Por malaltigi la kostojn ni povas ne plu mencii ekz. la postenon de direktoro de la EEC aŭ la nomon de la ĉefdeligito de UEA.
La nova teksto de la interna regularo aperos sur alia paĝo de ĉi tiu Informilo, kondiĉe ke la ĝenerala kunveno aprobas la ŝanĝojn posttagmeze.

SEKVONTA KUNVENO : 14.V. Bv. noti la daton.

# PROTOKOLO

pri la ĝenerala jarkunsido je sabato la 12-an de marto 1988 en Antverpeno

---

Ceestis : Aalst : Hilde Vaningelgem, Raimond Steenhout (loĝas en Ninove); Antwerpen : Jules Verstraeten, Dirk De Weerdt, Ivo Durwael, Paul Peeraerts; Brussel + BEFA : Lucien De Sutter; Beringen : pastro Beckers, Gustaaf Rombaut; Brugge : Georgette Alberto-Wybouw; FLEJA (kaj Gent) Jean-Pierre VandenDaele; Genk : Mathieu Habex, Drika Mandervelt, Willy Minnen; Gent : Arpad Lödör, Katja Lödör, Hubert Audenaert (loĝas en Lokeren), Monique Caestecker; Hasselt : Marcel Aerts; Kortrijk : J.Pierre Allewaert, Jan Hanssens, Cesar Vanbiervliet; Leuven : Marc vanden Bempt; Limburg : Jos Van den Bergh; Mechelen : Roger Saels; Mortsel : Jan Bovendeerd; Oostende : ges-roj D'Hulster.

Senkulpigis : Albert Claesen, Herman & Annie Deceuninck, Alex Humet, Fernand Roose, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Edward Symoens, Raymond Wylleman.

Komenca horo : 14h20, fino 17h30

Prezidas ID, protokolas MC

## I. ENKONDUKAJ VORTOJ

### 1. Depono de lernolibroj

ID prezentas ideon pri depono de lernolibroj en butikoj pere de la lokaj grupoj ĉar evidentiĝis ke la reprezentantoj de la eldonejo 't Spectrum ne estis sufiĉe motivitaj por instigi libro-butikojn aĉeti la pakaĵon kun lernolibro, kasedo, vortaro. La grupo pagas 700 BEF al FEL. Estas kontraktoj inter FEL - librobutiko - loka grupo. Krome haveblas afiŝo por pendigi kiel varbilo en la librobutiko.

### 2. Afiŝo

Kritiki estas facile. La esenco estas ke temas pri profesia aspekto, pri bildo kiu trafas.



La sistemo estas ke ni presigas grandan kvanton por malalta prezo.
Se vi donacas 1000 BEF vi ne devas pagi impost-ojn kaj vi ricevas 133 afiŝojn. Eblas fotokopii sur ĝi, do grupo povas meti sian tekston ĉe la Esperanto-centro aŭ ĉe alia fotokopicentro por kopii sur la afiŝo.

### 3. Denis Keefe

Tiu eksterordinare kapabla homo pri lingo-instruado restos dum unu semajno en Flandrio. La 30-an de aprilo okazos studotago en Ant-verpeno pri kiamaniere efike organizi lingvo-kurson. Nepre ne maltrafu tion.

### 4. FEN-informtago je la 28-a de majo

vidu ankaŭ la inviton sur la kovrilpaĝo de ĉi tiu Informilo. La dato ŝanĝiĝis.

## II. GRUPAJ RAPORTOJ

- Marc vandenBempt sugestas por meti la telefon-numeron de la loka grupo en la flavaj folioj. En Leuven ĝi aperis en la rubriko de traduk-servoj kaj eĉ venis reago por traduki tekston, kiu enspezigis monon al la klubo.
- Por la Brusela grupo Lucien De Sutter emfazas la Eŭropan manifestacion je la 28-a de junio kaj la sukcesan Zamenhof-tagon en la Flandra Kulturdomo.
- Hilde Vaningelgem raportas ke Aalst havas regulan kunvenon ĉiumonate.
- S-ro Audenaert raportas pri sukcesa kunveno pri Esperanto en kunlaboro kun Davidsfonds.
- Dirk De Weerdt konstatas ke gastprelegantoj en La Verda Stelo tre allogas homojn. Ili alportas apartan dimension kaj kelkfoje kuiras por la membroj. Ankaŭ sukcesaj estas programoj kun muziko, teatraĵoj, do distraj kaj kulturaj programoj. Ne tro sukcesaj estas la labor-grupoj por altiri komencantoj (kiuj ne venis). La jubilea festo estis granda sukceso kun bonega etoso.

Esperanto-Ligo Limburgo.

La nomo "LEL" restos la mallongigo de "Limburga Esperanto-Ligo"

La laborlingvo dum la kunvenoj restas provizora la Nederlanda (multe da komencantoj)

Superrigardo de la pasinta jaro.

Raporto de LEL.

- Esperanto-Limburgo fondiĝis je la 16-a de marto 1987.
- FEL aprobis kaj subtenas la Limburgan proponon en la FEL-estrarkunveno je la 11-a de aprilo 1987.
- Okazis Esperanto-kurso en la Kultura Centro de Genk (feb.87) partoprenis 7 kursanoj el kiuj 4 finis la kurson.
- Okazis info-vespero en la Kultura Centro de Genk (22-04-87) ĉeestis 18 personoj el kiuj 11 aliĝis al la Genka grupo.
- LEL partoprenis en la komerca jarborso en Genk (29-04/10-05) kostoj: 6 565,-
- LEL havis inform-standon en la lernejo en Tongeren (28-05-87)
- LEL partoprenis en la "ANGLA SEMAJNO" en "Shopping 1" (19-06 t/m 28-06 1987)
- La "Limburga Tago" okazis je la 29-a de aŭgusto 1987.
  adreso: J.HERMANS, Swinnenwijerweg 42, 3600 Genk
  programo: vizito de la kluzo
  vizito de la elektrofarejo EBES
  vizito de la fiŝbredejo EBES
- J. VANDEBERGH havis intervjuon je la loka radio "Radio Demervallei" en Diepenbeek (04-10-87 , 12-13)

Estrarelekto:

Unu delegito en la Limburga estraro po 20 gemembroj de la loka grupo.
La membrolistoj montras:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Beringen: | 13 | do | 1 delegito | -> | pastro BECKERS |
| Genk: | 24 | do | 2 delegitoj | -> | M. HABEX, R. DANIELS |
| Hasselt: | 50 | do | 3 delegitoj | -> | M. AERTS, A. CLAESEN, J. VANDEBERGH |

Raporto Hasselt

Superrigardo de la pasinta jaro.

La plejmulto de la propagandaj taskoj transprenis Esperanto Limburgo.
Por Hasselt restis nur la infoborso en la kultura centro kaj la kurso en la Provinca Lernejo pri Lingvoj.
La programon de la pasinta jaro trovu ĉi-kune.

Elekto de la estraro.

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Marcel AERTS |
| Vic-prezidanto: | Jef GERAERTS |
| Publikaj Rilatoj: | Jos VANDEBERGH |
| Sekretario/Kasisto: | Albert CLAESEN |



JANUARO 1987

5 - 1 - 1987: Lingvostudoj, komuna tradukado
19 - 1 - 1987: Informatie avond over Esperanto (A. BECKERS)

FEBRUARO 1987

2 - 2 - 1987: Lingvostudoj, komuna tradukado
16 - 2 - 1987: Prelego kaj lumbildoj pri Sri Lanko (A. BECKERS)

MARTO 1987

2 - 3 - 1987: Lingvostudoj, komuna tradukado
9 - 3 - 1987: Kvizo (J. HERMANS)
30 - 3 - 1987: Prelego kaj lumbildoj pri Aŭstrio (M. AERTS)

APRILO 1987

13 - 4 - 1987: Lingvostudoj, komuna tradukado
27 - 4 - 1987: Prelego pri "LA PROFETO de Kahlil GIBRAN" (J. GERAERTS)

MAJO 1987

11 - 5 - 1987: Lingvostudoj, komuna tradukado
25 - 5 - 1987: Prelego pri la kongreso kaj buskaravano al VARSOVIO (Kiki)

JUNIO 1987

15 - 6 - 1987: Lingvostudoj, komuna tradukado
29 - 6 - 1987: Interkonsentoj pri la Jubilea Kongreso en Varsovio
gastparolanto: A.STAES

weekeinde 5/6 sept. 10-19 uur: Jaarlijkse Info-beurs in C.C.Hasselt
Uitgebreide info-stand met mogelijkheid tot inschrijven voor een cursus Esperanto in Hasselt.
Tussen de inschrijvingen, gedaan tijdens dit weekeinde, worden twee studiepakketten verloot bestaande uit: een leerboek, een woordenboek en een cassette voor de uitspraak.

maandag 7 sept. 20 uur: Nabesprekingen Wereldcongres in Warschau

maandag 21 sept. 20 uur: Algemene Vergadering
agenda:
1. Overzicht voorbije jaar
2. Kasverslag
3. Bestuursverkiezingen
4. Toekomstperspektieven
5. Varia

maandag 5 okt. 20 uur: Diavoorstelling Wereldcongres in Warschau (M. AERTS)

maandag 19 okt. 20 uur: Vertaling "Jef GEERAERTS door Jef GERAERTS"

maandag 9 nov. 20 uur: Taalstudie

maandag 23 nov. 20 uur: Spelen met woorden (A.CLAESEN)

maandag 7 dec. 20 uur: Taalstudie
Inschrijvingen voor ons klubfeest op 21 december (trouwe leden krijgen korting in functie van hun aanwezigheden op onze vergaderingen)

maandag 21 dec. 20 uur: Klubfeest

Agado ESPERANTO 2000 vzw dum 1987.

- kurso por komencantoj '86/87 : 6 lecionoj en '87 + ekzameno (18.2.87). Finis (25) kursanoj.
- VESPEROJ 2000 : dekfoje en la jaro ; daŭra strebado al pli multaj ĉeestantoj: meze 12,2 partoprenantoj ('86 : 10,4)
- 2a/3a-jara kurso '86/87 : 6 lecionoj en '87, finis 4 kursanoj
- kurso por komencantoj Lage Drempel : finis 2 kursanoj
- revuo Eo2000 regule aperis 6-foje en la jaro. Nun sekvas plene la kalendaran jaron. Redaktas kaj administras F.Guldentops
- 11 estrarkunvenoj tra la jaro, unu ĝenerala kunveno
- 2 estrarkunvenoj kaj informvespero en Halle : tie ni helpis la starigon de nova loka grupo
- Semajno de Internacia Amikeco, inaŭgura festo. Ĉeestas ± 150 personoj entute, 21.02.1987
  Ĉeestas 2 ĵurnalistoj kaj gazetfotografisto. Aperis almenaŭ 4 artikoloj.
- Intervjuo por Veto
- Kadrokurso pri publika parolado : 3 personoj de Eo2000 (Antwerpen, 24.1.1987)
- Seminario VDSC (Roland Van Hecke) pri aspc. Ĉeestas Carl Deseure por Eo2000.
- Kadrokurso FEL pri kunven- kaj debat-teknikoj 28.3.87. Ĉeestas por Eo2000 LR, FG, MV.
- ĝenerala kunveno FEL 14.3 : ĉeestas 1 reprezentanto
- Flejakunveno 28.3, ĉeestas 2 personoj por Eo2000
- Lerneja prezentado de la lecionoj Esperanto en 87/88, en Paridaens, 9.5.87. Aranĝis Helga Vanderbiest
- Gambrinofestoj, kun 'Bakkersmolen van Essen-Wildert' kaj 'De Beul'. 4 tagoj, profito ĉirkaŭ 15.000 BF.
- Partopreno kongresoj : Krakow IJK (2 personoj), Varsovio UK (5 personoj), Waasmunster Fleja-semajnfino (6 personoj), Hannover IS (1 persono)
- Daŭriga kurso 'Laborvesperoj 2000', 3-foje en 1987, meze 7 partoprenantoj
- Informvespero pri Esperanto, 17 partoprenantoj, 14.10.87 ; post sufiĉe granda informkampanjo
- Semajnfina rapidkurso, sukcesis 6 kursanoj (unu ne)
- Unuajara kurso, 9 lecionoj en 1987. Aliĝis ± 12 personoj.
- Koktelvespero 18.12.87, partoprenis 13 personoj.
- komencis skribaj kursanoj : 3 unuajaraj, 3 duajaraj (?)
- Almenaŭ 55 informpetoj estis persone kaj detale responditaj, kuninformbroŝuroj.
- gvidliniaro finprilaborita, novaj libroj en Biblioteko 2000, katalogojn por nia bib, por bib urba faritaj, rapidkurso Auld reeldonita en bela formo.
- Kurso en Paridaens Leuven, kaj en Tienen.





## JARRAPORTO = AKTIVECOJ 1987

Dum la jaro 1987 sama favora vento trablovis nian grupon, kiel la antaŭan jaron. La diversajn aranĝitajn aktivecojn ni metis sub la signo de la Centjara Jubileo de Esperanto.- Jen la plej gravaj eventoj :

AMPLEKSA EKSPOZICIO (01-17/10) - en la Urba Publika Biblioteko - Ĉe la malfermo ni bonvenigis ĉ.60 da ĉeestantoj, inter ili kelkaj eminentuloj. Estis ege sukcesplena aranĝo kun entute ĉ.150 da vizitantoj.-- Aliflanke, nia informstando & ekspozicieto dum la "Libertempa Foiro" (04-08/03) ankaŭ vekis intereson de ĉ.70 da vizitantoj.

NOVA KURSO
Ankaŭ la kurso tre bonsukcesis. Ni enskribis 27 kursanojn, inter ili 6 gejunulojn. Intertempe 12 kursanoj membriĝis. Dum la unuaj 8 lecionoj, ni salutis 207 da ĉeestantoj. Momente, la kurso daŭrigas. Novaĵo estas ke ni enkondukis 2 sinsekvajn kun-[...]ojn la saman vesperon, en la sama ejo : unu por komencantoj la alia por progres-[...]oj.

MEMBROVARBADO
Diversaj cirkonstancoj (ekspozicioj, kurso, gazetaraj artikoloj, personaj kontaktleteroj) stimulis decan intereson, tiel 28 novuloj aliĝis, inter ili 5 gejunuloj. Fino de februaro nia membraro sumiĝis je 87.

GAZETARA SERVO
La multnombraj artikoloj (27) verkitaj de la klubsekretario kaj aperintaj en la lokaj gazetoj, pri Esperanto kaj niaj aktivecoj, kondukis al bonega rezultato. Ankaŭ la gazetoj multe atentigis la publikon pri la ekspozicio kaj la kurso, sendube dank' al nia gazetara konferenco.

VIZITOJ al la *"ESPERANTO-FONDAĴO"*
Tre menciinda ankoraŭ estas la senĉesaj vizitoj al la "Esperanto-Fondaĵo", de enkaj eksterlandaj esperantistoj kaj interesuloj. Ni notis 42 vizitojn, kun entute 354 personoj. Ankaŭ dum la ekspozicio la biblioteko de la "Esperanto-Fondaĵo" altiris multajn. Ne forgesu, 7-foje ni ricevis vizitojn de studentoj por konsulti, esplori, traserĉi... diversajn dokumentojn,pro tezo, eseo, prelego, ktp. rilate al Esp.

BIBLIOTEKO de la *"ESPERANTO-FONDAĴO"*
Jarfine 1987 la enhavo estas jene :
8.113 libroj -- revuoj : 9.394 jarkolektoj, t.e. 5.409 jarkolektoj kompletaj kaj binditaj - 1.891 diversaj titoloj.
La giganta nombrokresko de libroj ni dankema ŝuldas al T.Kehlet.

T.V. & RADIO
Dum la programo de "Terloops"(24.01), la BRT elsendis filmbildojn prenitajn en la "[...]speranto-Fondaĵo"(Biblioteko).- Por la radio, 2 intervjuojn kun la sekretario [...]is elsenditaj : unu ĉe "BRT.2 West-Vlaanderen" (16.10), la alia ĉe loka radio "[...]SOLAR" (10.12).

KLUBA AGADO - ĜENERALAĴOJ
Dum la tuta jaro ni organizis 26 kunvenojn k.s., inkluzive tiujn de la nova kurso. Entute ni notis 558 ĉeestantojn, t.e. meznombro de 21,46 po kunveno. Kun lumbildoj estis prezentitaj 2 lecionoj kaj 4 prelegoj. Okazis 12 kunvenoj kun priparolado, diskutado, ktp. Aldone ankaŭ 8 lecionoj de la nova kurso.-- Plue, ni mencias partoprenojn al diversaj kongresoj, renkontiĝoj, ktp.
*Rimarkindaĵoj:* Unue, gruptraduko de la informfolio pri AIDS, kiu aperis en Medicina Internacia Revuo pere de nia membro Dro.De Backer. Due, tiu ĉi membro ankaŭ komponis muzikaĵon por kvarvoĉa kanto laŭ la teksto de G.Gezelle "Se aŭskultas la animo", kiu jam plurfoje aŭdiĝis en nia regiono, eble ankaŭ aliloke.(Londona Horo)

MEMBROKOTIZO
Efektive, nia timo esprimita dum la antaŭa ĝenerala FEL-kunveno, veriĝis. Multaj membroj rezignis la kotizon pro tro granda plialtiĝo, ni diru eĉ duobliĝo. Krome, tio aranĝo bremsis nian intencon por atingi la kabon de 100 membroj.-- Sed, por kompensi parte tion, nia klubo kreis specialan tarifon (250 F) por socialaj kazoj, tiel ke la kontaktoj kun la klubo kaj la Esperanto-movado ne rompiĝus, ankaŭ profite al la tuta Esperantistaro.

J.H.

Esperanto Klubo Oostende - La Konko

Raporto pri la jaro 1987

La semajna kurso kiu komencis en 1986 en la domo de la geedzoj D'Hulster daŭrigis kun 9 gelernantoj. Instruisto: s-ro Alberto Manuel. La 31-an de marto okaziĝis kunveno kun Ivo Durwael pri la modaloj rilate al la refondigo de la ostenda grupo. Refondigo, jes, ĉar jam en 1931 fondiĝis la Ostenda Esperantista Grupo, kiu malfunkciiĝis dum la militaj jaroj 40-45. Post la milito ĝi restariĝis, kaj 'ekdormis' je la mezo de la kvindekaj jaroj. Fali kaj stariĝi, tio estis la sorto de la ostenda grupo, kiu denove estas aktiva kiel 'Esperanto Klubo Oostende, La Konko'.

| | | |
|---|---|---|
| Estraro : | Prezidanto | Raymond Wylleman<br>August Vermeylenstraat 65/8400 Oostende<br>tel. 059/502708 |
| | Vicprezidanto/ Kasisto | André D'Hulster<br>Paul Michielslaan 10 /8400 Oostende<br>tel. 059/800695 |
| | Sekretariino | Thérèse D'Hulster-Boudt<br>sama adreso |

En junio la estraro dissendis al ĉiuj interesuloj en Oostende kaj ĉirkaŭaĵo tekston kun invito al la malfermita vespero de la 19-an en la kunvenejo de la ostenda kultura konsilio. La 18-an, dum la ĝenerala kunveno de ĉi tiu konsilio, la sama letero disdoniĝis al la delegitoj de la kulturaj asocioj.

Dum ĉi tiu malfermita vespero s-ro Alberto donis la lastan lecionon de la kurso. Poste s-ro G.Maertens disdonis la atestojn al la kursanoj. Du ĉarmaj sinjorinoj prelegis partojn de la 'Balado de la Miskompreno', flandra popolrakonto en traduko de Raymond Wylleman. La aŭtoro Raf Seys ĉeestis la tutan vesperon, same kun multaj eminentuloj de la flandra Esperanto-movado. Ilia ĉeesto estis por ni kaj honora kaj kuraĝiga.

En septembro la unua novaĵletero 'La Konko' anoncis du kursojn : A, ĉiusemajna, por komencantoj; B, ĉiuj du semajnoj, por progresantoj.

La 2-an de oktobro, la instruisto s-ro Alberto komencis kun 13 kursanoj, kaj sia edzino, s-rino Georgette Wybouw, kun 14.

La 20-an de novembro s-ro G.Maertens parolis pri la U.K. en Varsovio kaj montris lumbildojn. Inter la ĉeestantoj sin trovis pola sinjorino kaj hispaniaj geedzoj.

La 4-an de decembro la geedzoj Alberto-Wybouw montris lumbildojn pri sia vojaĝo al Santiago de Compostella.

La 18-an ni havis agrablan kluban kunvenon.



Nia klubejo estas la kunvenejo de la ostenda kultura konsilio, Leffingestraat 85. Luprezo : 250 fr povespere.

La loka gazetaro ricevis ĉiufoje informojn pri niaj aktivecoj kaj plej ofte publikigis ilin.

La monata novaĵletero ĉiufoje disvastiĝis 60-ekzemplere.

Membroj : La Konko : 31
FEL : 18

André D'Hulster — Raymond Wylleman

(LASTA PARTO DE LA RAPORTO "LA PROGRESO" DE LA SEKVONTA PAĜO)

## LA PROGRESO

### Koncize

Okazis 10 estrarkunvenoj, 7 kulturkunvenoj, 1 ĝenerala jarkunveno, 1 informvespero, la serĉopromenado, la Zamenhoffesto.

Krome 5 kunvenoj de la L.K.K. por la F.E.L.-kongreso en 1988 kaj 5 surlokaj esploroj por tiu kongreso, rilate dormejon, kongresejon, inaŭgurejon.

Ĉefaj priokupoj (kaj zorgoj) estis la aperigo de la Esperanto-teksto de la broŝuro pri Gent kaj la preparoj por la okazigo de la F.E.L.-kongreso en Gent, aŭguste 1988.

### TURISMO (raporto de Nancy Haegebaert)

Ni havis jam bonajn kontaktojn kun pluraj grupoj en Flandrio, sed en 1987 ni klopodis havi kelkajn kontaktojn kun grupoj el Valonio.

- 26.04 : kelkaj membroj de nia grupo iris al la tago de Esperanto en Olne ĉe Lieĝo
- 30.05 : al Eupen
- 05.07 : al Charleroi por la pikniko kiun organizis la loka grupo
- 22.08 : Nancy gvidis kelkajn membrojn de nia grupo sed precipe membrojn el diversaj valonaj kaj flandraj grupoj en Bruĝo.

RAPORTO DE LA GENTA ESPERANTO GRUPO "LA PROGRESO" 1 9 8 7

januaro

18.01 : estrarkunveno kune kun kongreskunveno (ĉe Monique)
23.01 : ni rigardis en la "Home Fabiola" - eventuala kongresdormejo
23.01 : ĝenerala jarkunveno en Sluizeken-châlet
28.01 : rendevuo en la skabinejo de Y. De Clercq pri la eldono de broŝuro en Esperanto pri la urbo Gent

februaro

02.02 : rendevuo kun la estrino de la "Home Fabiola"
12.02 : estrarkunveno (ĉe René)
27.02 : la Aalsta grupanoj montris al ni Esperantan-komputil-programon en la Sluizeken-châlet

marto

12.03 : estrarkunveno (ĉe Ludo)
27.03 : varia vespero gvidita de Patrick en la Sluizeken-châlet

aprilo

10.04 : estrarkunveno (ĉe Lucien)
24.04 : kulturkunveno pri Esperanto-literaturo prezentita de s-ro Fernandez en la Sluizeken-châlet
25.04 : ni rigardis la eblan kongresejon "Huis van de Gouverneur"
30.04 : kunveno pri la kongreso (ĉe Katja)

majo

11.05 : ni esploris la inaŭgurejon por la kongreso "Toreken"
23.05 : serĉpromenado en la urbo

junio

23.06 : estrarkunveno kune kun kongreskunveno (ĉe René)
26.06 : Jules Verstraeten parolis dum kulturkunveno pri Johano sen timo en la Sluizeken-châlet

julio

11.07 : kunveno pri la buĝeto por la kongreso kune kun la estrarano pri financoj de F.E.L. Roland Rotsaert (ĉe Katja)

aŭgusto

10.08 : estrarkunveno (ĉe Ludo)
26.08 : kunveno pri la kongreso (ĉe Monique)

septembro

04.04 : informvespero pri Esperanto, gvidita de Ludo en Sluizeken-châlet
08.09 : starto de nova Esperanto-kurso en la Volkshogeschool, gvidas la unua jaro Ludo, la dua jaro René kaj Katja; 15 novaj kursanoj
16.09 : estrarkunveno (ĉe Patrick)
18.09 : kontakto kun la St.-Pietersabatejo kiel ebla kongresejo
25.09 : - promeno kun klarigoj en la botanika ĝardeno, gvidita de Willem Rasschaert
- varia vespero, gvidita de Patrick en Sluizeken-châlet

oktobro

21.10 : estrarkunveno (ĉe Ingrid)
23.10 : kulturkunveno pri la pasintaj kongresoj en Krakovo kaj Varsovio kun diapozitivoj de Nancy Haegebaert en Sluizeken-châlet



novembro

09.11 : estrarkunveno (ĉe René)
27.11 : kulturkunveno pri Bulgario, ne nur lando de rozoj, de Pauline Lazarova, kun kelkaj diapozitivoj, kvizo, ...

decembro

10.12 : estrarkunveno (ĉe Katja)
20.12 : Zamenhoffesto en la Club Nautique

Aliaj renkontiĝoj kie ni partoprenis

24.01 : parolteknikoj kaj publika parolado, tuttaga studtago gvidita de Paul Peeraerts en Antverpeno - 3 pers.
13.02 : prelego pri prahistoriaj bestegoj en Antverpeno - 1 pers.
21.02 : Tago de la Internacia Amikeco en Loveno
14.03 : F.E.L.-jarkunveno en Antverpeno - 3 pers.
21.03 : 50 jara ekzisto de la Bruĝa Grupo Paco kaj Justeco kun Akademia kunsido kaj akcepto en la urbodomo - 5 pers.
3 - 5.04 : Nederlanda Esperanto-kongreso en Amersfoort - 4 pers.
17.04 : vizito al la biblioteko en Kortrijk - 4 pers.
23.04 : kultura prezentado de polaj grupoj en Aalst - 7 pers.
08.05 : Ludo prezentis informvesperon pri Esperanto en Zottegem, por la "Vermeylenfonds" - 3 pers.
15.05 : informvespero pri Pollando kaj la F.E.L.-karavano al Varsovio de Kristin Tytgat en Antverpeno
16.05 : trilanda renkontiĝo en Eschweiler
12.06 : Willy Grela prelegis kun diapozitivoj pri fotografio kaj fotado en Antverpeno - 1 pers.
28.06 : Eŭropa Festivalo en Bruselo
03.07 : la fama barbekuo en Aalst - 4 pers.
19 - 25.07 : IJK en Krakovo - 3 pers.
25.07 - 01.08 : UK en Varsovio - 6 pers.
21.08 : vespere en Antverpeno okazis agrabla kunesto kun partoprenantoj de IJK kaj UK en Antverpeno, kun diapozitivoj
29.08 : fama barbekuo en Genk, Limburgo, kun matena vizito al la kluzo kaj posttagmeze al la elektrofarejo - 4 pers.
20.09 : trilanda renkontiĝo en Wijlre (Nederlando)
26.09 : jubilea festo de La Verda Stelo en Deurne - 4 pers.
01.10 : malfermo de ekzpozicio en la biblioteko de Kortrijk
9 - 11.10 : K.T.P.-renkontiĝo en Oostkapelle (Zelando) - 4 pers.
17.10 : ĝenerala kunveno de F.E.L. en Antverpeno - 2 pers.
30.10 - 01.11 : FLEJA-semajnfino en Waasmunster; sabate ĉeestis 9 membroj de nia grupo.
06.11 : Alex Humet parolis pri instrumetodo de lingvoj en Antverpeno
13.11 : familio Matmoudi el Irano parolis pri ilia lando en Antverpeno - 4 pers.
28.11 : ĝenerala jarkunveno de B.E.F. en Bruselo - 2 pers.
12.12 : Jubilea Festo de Klubo Cent en Bruselo - 4 pers.
18.12 : Zamenhoffesto de La Verda Stelo en Antverpeno kun harpmuziko kaj kantado - 2 pers.
27.12 - 02.01 : I.F. en Kassel (2 pers.)

(LA RESTO DE LA RAPORTO - VIDU ANTAŬAN PAĜON SUB LA FINO DE OOSTENDE)

## III. FAKAJ ASOCIOJ

### 1. BEFA - Lucien De Sutter

- publikaĵoj en "Het Spoor - Le Rail".
- kursoj okazas du sabatojn en la monato, de oktobro al aprilo. Se kursanoj ne povas iri al la Brusela grupo, ili povas veni al la kurso de BEFA kaj inverse.
- La biblioteko de la fervojo akceptas nun ankaŭ Esperanto-librojn.
- Al fervojistaj aranĝoj povas partopreni ankaŭ ne-fervojistoj "eĉ se ili venas aŭtomobile".

### 2. FLEJA - Jean-Pierre VandenDaele

La estraro restas la saman (raporto pri la ĝenerala jarkunveno aperas poste en ĉi tiu Informilo). Fleja deziras sin prezenti ĉe junaj kursanoj kaj allogi ilin.

### 3. Petis la aliĝon

"Movado sen nomo", Esperanto-parto de "Bond zonder naam". Ĉi tiu jaro la Esperanto-traduko de "Menslief ik hou van je" aperas; FEL disvendas ĝin kiel la aliajn librojn do ankaŭ kun speciala procento.
Movado sen nomo havos standon en la UEA-kongreso en Roterdamo.

## IV. FINANCA RAPORTO

La spezokonto 1987, balanco 1987 kaj buĝeto 1988 estas akceptitaj de la ĝenerala jarkunven[o]. Malgajno ĉe Esperanto-Panorama, gajno kun la libroservo; entute malgranda gajno por 1987.

## VI. REBATA SERVO

Germain Pirlot iom haltis la servon pro ne sufiĉe da regulaj kunlaborantoj.

## V. SEKRETARIA RAPORTO



Flandra Esperanto-Ligo
vlaamse esperantobond v.z.w.
esperanto
internationale taal

KONCIZA JARRAPORTO 1987

INTERNA AGADO

I. NOVAJ GRUPOJ

Fondiĝis tri novaj grupoj : Oostende, Halle kaj Genk.
Krome jubileis du grupoj : je la 21-a de marto jubileo de "Paco kaj Justeco" Bruĝo kaj je la 26-a de septembro 80-jara jubileo de "La Verda Stelo" Antverpeno.

II. KADROKURSOJ

- 24.I : parolteknikoj kaj publika parolado
- 21.II : kadrokurso por kasistoj kaj sekretarioj (Leuven)
- 9-10.V : pedagogia semajnfino (Audrey Childs-Mee)
- 21.XI : studotago por kursgvidantoj

III. BUSVOJAĜO AL POLLANDO

Por la IJK en Krakovo kaj la UK en Varsovio, ni organizis busvojaĝon al Pollando, pere de Kristin Tytgat.

IV. PERADO DE REVUOJ

Ni pliokupiĝas pri la perado de revuoj. Okaze de malfacilaĵoj, ĉefe translimaj, Roland Rotsaert transprenis la taskon solvi tiajn problemojn.

V. REGIONA DIVIDO

Ni ankaŭ komencis solvi la problemon de membroj kiuj rekte pagas al F.E.L. sed kiuj ne indikas grupon. La flandra teritorio nun estas dividita inter la ekzistantaj grupoj.

VI. KUNSIDOJ

Okazis du ĝeneralaj kunvenoj de F.E.L. en Antverpeno : je la 14-a de marto kaj je la 17-a de oktobro.
Krome ni raportis en la B.E.F.-jarkunsido je la 28-a de novembro.

VII. LISTO DE PLANOJ

Konstatante ke ni faris tro multe da laboro, broŝuroj, informoj, k.t.p. por Esperantistoj, ni decidis eliri nian fermitan rondon petante profesian helpon. Danĝera paŝo en tiu direkte okazis en 1986. Unu el la plej okulfrapaj rezultoj estis la domstilo. Duan paŝon kelkaj estraranoj faris en silento dum 1987. Uzante profesian libron pri organizado en neprofitcelaj organizaĵoj, ni venis al komunaj starpunktoj kaj konkludoj por konkretigi

Frankrijklei 140 B-2000 Antwerpen ☎ (03) 234.34.00 | Kantooruren Oficaj horoj 9-12.30 - 13.30-17 h | Postrekening Ĝirkonto 000-0265338-43 | Bankrekening Bankkonto 402-5510531-55 | BTW AVI 419.028.122

niajn celojn, atentante niajn nunajn eblecojn.
Sekve listo de planoj estis kunmetita el kiu ni publikigis jam la plej urĝajn kaj ne tiel urĝajn taskojn, realigendajn en la tuja aŭ ne tiel fora estonteco.

EKSTERA AGADO

I. ELDONOJ

5 novaj libroj estis eldonitaj en 1987.
- Ĉu rakonti novele - Johàn Valano
- Kia miksaĵo - F.V.Dorno
- Sub la signo de socia muzo - William Auld
- Kazinski venas tro malfrue - Deck Dorval
- Beletre sed ne el katedro - Gaston Waringhien.

II. KONKURSO PRI SLOGANOJ

Ni organizis konkurson por trovi bonan sloganon. Post konsulto de profesia reklamagentejo kaj de interna ĵurio, jenaj sloganoj estis premiitaj :
"Esperanto, taal in beweging" kaj
"Esperanto, laat je vér-leiden".
Kun ĉi lasta slogano, afiŝo estis eldonita.

III. KUNLABORO NEDERLANDO

Ni daŭre strebas al pli bona kunlaboro kun Nederlando.
En 1987 ekzemple :
- interŝanĝo de informoj rilate al kadrokursoj por kursgvidintoj
- la 5-opa ĵurio por prijuĝi la plej bonan sloganon konsistis el tri nederlandanoj
- decido por perado de la nederlandaj Esperanto-revuoj "La Fenomeno" kaj "La Novaĵletero".

IV. EKSPOZICIO

Dirk De Weerdt kaj Alex Humet preparis modernaspektan ekspozicion, faritan el taŭga materialo.

V. JUBILEA NUMERO DE E.P.

Fine de la jaro aperis jubilea numero de "Esperanto Panorama" kiun ni ankaŭ sendis al ĉiu membro de la Jubilea Komitato.

VI. ESPERANTO EN LA KOMUNIKILOJ

Por Flandrio okazis 26 radioprogramoj kaj 4 televidelsendoj pri Esperanto (inter kiuj la elsendo "Terloops" je la 24-a de januaro). En la gazetaro aperis 61 grandaj artikoloj kaj 74 malgrandaj.

mc



VII. PREZIDANTA VORTO

1987 finiĝis ege kontentiga. Ni konstatas fortan koherecon inter estraranoj kaj komisiitoj. Oni ne povas sufiĉe alte taksi la homojn de la Esperanto-centro kiuj ne kalkulas en horoj de laboro. Veraj atingoj ankaŭ dependas de la grupoj kiuj pli kaj pli reprenas sian rolon de varbantoj. Ni konstante instigas unu la aliajn. Dankon al ĉiuj pro la sindediĉo kaj la etoso.

VIII. ALJUĜO DE PREMIO

La premio por la grupo kun la plej granda kresko de membraro dum 1987 estas por "La Konkordo" el Kortrijk.

IX. STATUTŜANĜOJ KAJ INTERNA REGULARO

- Paul Peeraerts klarigas la kialojn de la ŝanĝo. FEL estas "vzw" (asocio sen profitdona celo). Vzw. estas jure protektita ekz. kontraŭ bankrotiĝo, ... sed la kondiĉo estas ke ĝi estu jure komplete en ordo.
Statutoj devas esti aperigitaj laŭ certaj severaj kriterioj. Por esti jure komplete en ordo nun ke FEL pli kaj pli grandiĝas, juristo kontrolis la statutojn de antaŭ dek jaroj kaj trovis kelkajn erarojn (vd. la tekstojn en Informilo de februaro).
- Laŭ la interna regularo de FEL ni devas ĉiujare publikigi la nomojn de la administrantoj. En tiu granda listo, kelkaj oficoj ne plu agadas aŭ ne povas kontribui al FEL. La propono estas forigi tiujn funkciojn. Tiamaniere ni ankaŭ ŝparas monon.
- Krome ni ankaŭ devas adapti nian membrar-strukturon.
La statutŝanĝoj kaj la interna regularo (la teksto aperas aliloke en ĉi tiu Informilo) estas unuanime akceptitaj de la ĝenerala kunveno.

X. EKSIGO DE LA ESTRARO

Paul Peeraerts transprenas la gvidon de la kunsido kaj petas al la ĝenerala asembleo ĉu ĝi pretas sen-ŝarĝigi la malnovan estraron. Aprobite unuanime. Laŭtlegataj estas la nomoj de la administrantoj indikitaj de la grupoj:

| Grupo | Rajtas je adm. | Delegis |
|---|---|---|
| Aalst | 2 | neniun |
| Antwerpen | 3 | Ivo Durwael<br>Dirk de Weerd<br>Alex Humet |
| Brugge | 1 | G. Alberto |
| Brussel | 1 | L. de Sutter |
| Gent | 1 | N. Haeghebaert |
| Halle | 1 | neniun |
| Kalmthout | 1 | neniun |
| Knokke | 1 | Marmenout |
| Kortrijk | 2 | J.Hanssens<br>J.P.Allewaert |
| Leuven | 2 | W.v.Opdenbosch<br>M.Vd.Bempt |
| Limburg | 4 | A.Beckers<br>M.Habex<br>A. Claesen<br>Jos vd.Bergh |
| Mechelen | 1 | Roger Saels |
| Mortsel | 1 | Jan Bovendeerd |
| St.-Niklaas | 1 | neniun |

Al tiuj administrantoj aldoniĝas laŭofice Paul Peeraerts (FEL), Carl Deseure (FLEJA) kaj Guido van Damme (redaktoro Esperanto-Panorama).

Laŭ la regularo la antaŭa estraro rajtas proponi la kooptadon de pliaj administrantoj. Ĝi proponis Roland Rotsaert, Monique Caestecker, Hilde van Ingelgem, Kiki Tytgat, Edward Symoens. S-ro van Biervliet krome proponas s-ron Cardoen. La ĝenerala asembleo voĉdonas unuanime por la elekto de ĉiuj tiuj administrantoj.

Proponis sin kiel estraranoj: Roland Rotsaert, Monique



Caestecker, Hilde van Ingelgem, Edward Symoens, Alex Humet, Jan Bovendeerd, Ivo Durwael kaj Jos van de Bergh. La administrantaro unuanime akceptas tiun ĉi estraron por la oficperiodo 1988-1989.
La administrantaro krome elektas Ivo Durwael kiel prezidanton dum tiu oficperiodo.

## XI. ESTONTECO

La semajno de la internacia amikeco estos organizata en 1989 de Bruĝo, en 1990 de Kortrijk kaj en 1991 de Oostende.

## XII. FINA VORTO

Sekvas teksto de la prezidanto

? ? ? ? ? ?

La demando pri nia simbolo denove leviĝas. La opinioj polariziĝas. Ĝenerale la homoj kun tre longa Esperanto-tradicio preferas la stelon. Aliflanke, junuloj kaj personoj kiuj opinias ke la agado en la pasinteco ne estis kontentiga, aplaŭdas la uzon de nova simbolo. Sed simbolo ne estas io memstara. Ĝi simbolu indan enhavon. Kiam ni decidis en la estraro de FEL por uzadi la jubilean simbolon ankaŭ post la jubilea jaro, tio certe ne signifas ke ni volis malaprezi la laboregojn de antaŭa generacio. Tio jes signifas ke ni volas konscie rompi kun iuj tradicioj en la Esperanto movado : tro da individuismo, disspliteco, ĉiu en sia angulo, kaj sekve de tio tro malgrand-skala agado. Anstataŭe ni emus veni al unu granda milda ronda harmonia, kie dekstre kaj maldekstre, supre kaj sube ne formas konstrastojn sed partoj kiuj fluas unu en la alian, kaj tiel formas bildon adaptita al la nuntempo.
Por esti adaptita al la nuntempo, la FEL-estraro daŭrigis analizadon, kiu iniciĝis jam antaŭ pli ok dek jaroj, kaj en kiu ĉefrolis tuta serio da personecoj kiel i.a. Paul Peeraerts, Gregoire Maertens, Jules Verstraeten, Wim de Smet, Edward Symoens, Petro De Smedt, Eric D'Hondt, Jan Bovendeerd, Roland Rotsaert kaj multal aliaj. Laŭ mi unuafoje en sia historio la estraro sukcesis analizi la situacion de FEL, ellabori labor-



planon kaj - tio estas nova - ĉiumonate denove reekzameni, adapti, ĝustigi, komplet-igi ĝin pro akiritaj spertoj.
Mi forte insistas por fari ion similan por via loka klubo.
La kerna demando pri la simbolo estas :
ĉu ni laboru por konservi la estintecon, ĉu por malkovri novajn eblecojn !

Ivo Durwael.

Post ĉi tiuj vortoj la kunveno fermiĝis.

---

Dum januaro kaj februaro 1988 venis entute 18 skribaj kaj 2 telefonaj informpetoj laŭ jenaj kriterioj :

| | |
|---|---|
| - Esperanto, kio estas tio | 11 |
| - kurseblecoj | 2 |
| - adresoj lokaj kluboj | 1 |
| - aliaj | 4 |
| - telefonalvokoj | 2 |
| | 20 |

Regularo de interna ordo - Huishoudelijk reglement.

1. MEMBROJ.

1.1. La membrokategorioj de la Flandra Esperanto-Ligo estas
- membro (M)
- familia membro (FM) = familiano de persono el la kategorio M, kaj loĝanta je la sama adreso.
- subtenanta membro (SM)
- dumviva membro (DM)
- asocia membro (AM) = membro aliĝanta al la ligo per la dispono antaŭvidita en par. 4-a de la statutoj. (membroj de fakaj grupoj aŭ fakaj asocioj).

1.2. Nur la personoj de la kategorioj M, SM kaj DM havas voĉdonrajton en la ĝenerala asembleo.

1.3. La membroj, escepte de la AM, aliĝu al la ligo pere de loka grupo aŭ rekte per pago de la kotizo al la kasisto de F.E.L. La kasisto de F.E.L. komuniku la adresojn de rekte aliĝintaj membroj al la grupo plej proksima ĉe ilia loĝloko, tiel ke ili povas esti registritaj en tiu grupo.
La asociaj membroj pagu sian kotizon al la faka asocio.

1.4. La administrantaro decidas ĉiujare, kiam ĝi fiksas la kotizojn, pri la revuo(j) sendata(j) al la membroj.

2. GRUPOJ, REPREZENTANTOJ KAJ FAKAJ ASOCIOJ AŬ FAKAJ GRUPOJ.

2.1. Ĉiu loka Esperanto-grupo kaj ĉiu faka Esperanto-grupo aŭ faka asocio, kiu deziras aliĝi al la Ligo, petas tion skribe al la sekretario de la Ligo.
La peto devas esti subskribita de la prezidanto kaj de la sekretario de la petanta grupo aŭ asocio.
Al tiu peto estu aldonita :
- kompleta listo de la estraro de la grupo aŭ asocio;
- en la kazo de faka grupo aŭ -asocio : la membronombro;
- en la kazo de loka grupo : membrolisto kun familia nomo, propra nomo, naskiĝdato kaj adreso de ĉiu membro, eventuale kun la nacieco kaj la profesio.
- ekzemplero de la statuto aŭ ĝia projekto, se tio ekzistas.

2.2. En lokoj, kie ne ekzistas loka Esperanto-grupo, la Ligo povas nomi reprezentanton, kies tasko estas esplori la eblecon starigi lokan grupon.

2.3. La Ligo havu laŭprincipe nur unu grupon en iu urbo aŭ vilaĝo. Se ie unu alia grupo ŝajnas esti utila, la estraro de la Ligo povas akcepti tiun plian grupon.

2.4. Sur sia leterpapero, la lokaj grupoj menciu : sekcio de Flandra Esperanto-ligo aŭ Afdeling van de Vlaamse Esperantobond.

2.5. Ĉiu loka grupo enkasigas ĉiujare la kotizojn kaj transpagas al la kasisto de F.E.L. la parton destinata al la Ligo;

2.6. Ĉiu loka grupo kaj ĉiu reprezentanto :
- regule raportas al la sekretario de la Ligo pri sia aktiveco,
- informas la Ligon pri ĉia Esperanto-aktiveco en sia regiono (kurso, prelego, artikoloj ktp.)

2.7. Fakaj asocioj aŭ fakaj grupoj interkonsentas kun la estraro de F.E.L. pri la kontribuo pagota al F.E.L.

2.8. Se okaze de likvido de iu loka grupo aŭ reprezentanta ofico, ties tuta proprajo transiras al la Ligo; tiu proprajo restas dum tri jaroj je dispono de eventuala novstarigota grupo aŭ nova reprezentanto en la sama urbo aŭ vilaĝo.

3. ADMINISTRANTARO.

3.1.1. Ĉiu loka grupo rajtas reprezentiĝi en la administrantaro de F.E.L. per unu membro por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj, kiuj estas regule enskribitaj en tiu grupo je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro. La kandidatoj estu proponitaj al la sekretario de la Ligo antaŭ la fino de februaro.



3.1.2. La jenaj funkciuloj apartenas aŭtomate al la administrantaro, se ili jam ne estas delegitaj per sia loka grupo, kondiĉe ke ili estu membro de F.E.L. :
- la direktoro de la Flandra(j) Esperanto-Centro(j) (par. 7-a de la regularo)

- la ĉefredaktoro de ESPERANTO PANORAMA aŭ de alia periodaĵo de F.E.L.

- la reprezentanto de F.L.E.J.A.

3.1.3. Al la ĝenerala asembleo la estraro prezentas liston de personoj, kiuj pro iliaj meritoj indus aparteni al la administrantaro.
El ili, la asembleo elektas administrantojn ĝis nombro kiu ne povas superi unu trionon de la nombro de administrantoj de la kategorioj 3.1.1. kaj 3.1.2.

3.1.4. Ĉiu aliĝinta faka asocio aŭ -grupo rajtas sin reprezenti en la administrantaro per unu voĉdonrajta membro.

3.2. La administrantaro estas kunvokata de la estraro; ĉi tiu estas devigata tion fari je peto motivita kaj subskribita de minimume kvin administrantoj.

4. ESTRARO

4.1. La estraro estas elektata de la administrantoj laŭ la principoj de par. 11-a de la statuto.
Ĝi respondecas pri la informado pri Esperanto kaj tiurilate ĝi sekvas la direktivojn de U.E.A.
Ĝi prizorgas i.a. korespondajn servojn kaj kursojn, gazetaran kaj ekspozician servon kaj eldonaĵojn.
Ĝenerale ĝi faras ĉion kio povas disvastigi la konon de Esperanto.

4.2. La sekretario prizorgas la ĝeneralan korespondadon, sendas la kunvokilojn al la membroj por estrar-, administrantar- kaj ĝeneralaj kunsidoj, li respondecas pri la protokoloj kaj la arĥivoj.

4.3. Por ĉiuj aliaj taskoj, la estraranoj interkonsentas pri koncerna prizorganto.

4.4. La kasisto repagas la administrajn elspezojn konforme al la buĝeto. Por pagi neordinarajn agadojn, necesas antaŭa aprobo de la estraro.

4.5. La estraro rajtas dungi oficistojn kaj decidas pri ilia salajro.

4.6. Ĉiujare la de la grupoj proponitaj administrantoj, escepte de dum-gitoj, rajtas kandidatiĝi por posteno en la estraro. Ili faru tion ĝis fino de februaro per letero adresita al la sekretario de la Ligo.

5. VOĈDONADOJ.

Ĉiuj decidoj estas alprenataj per simpla plimulto de la voĉoj, escepte en la laŭleĝe antaŭviditaj kazoj. Ĉe voĉegaleco, la voĉo de la prezidanto estas decidiga.

6. ESPERANTO-RENKONTIĜOJ

6.1. Laŭ ebleco, la estraro organizu ĉiujare kongreson aŭ semajnfinan aŭ unutagan renkontiĝon, kiu funkcias laŭ speciala regularo aprobita de la administrantaro.

6.2. Tiu kongreso aŭ renkontiĝo povas okazi elster la nederlandlingva teritorio de Belgio

7. FLANDRA(J) ESPERANTO-CENTRO(J).

7.1. Por pli efike realigi la celojn de la Ligo, kiel ili estas priskribitaj en par 3-a de la statuto, la estraro povas starigi Esperant-centro(j)n en la nederlandlingva teritorio de Belgio kaj en la Brusela aglomeracio.

7.2. La ĉiutaga laboro de tiu centro estas gvidata de direktoro, kiu agas laŭ la direktivoj de la estraro. Li estas nomita, kontrolata kaj eventuale maldungita de la estaro. Li rajtas ĉeesti ties kunsidojn. Li estu preferinde, sed ne necese, salajrata por tiu ofico.

7.3. La aliaj oficistoj de la Flandra(j) Esperanto-centro(j), ĉu salajrataj, ĉu volontulaj agas laŭ la direktivoj kaj sub la kontrolo de la direktoro de la koncerna centro.

7.4. La Esperanto-centro(j) ne nur estas administra(j) ejo(j), sed ankaŭ centro(j) por la pristudado de la lingvaj problemoj kaj de ilia solvo.

---

Ĝenerala jarkunveno de FLEJA je sabato 27a de februaro 1988 en Leuven okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

Komenca horo : 10h15.

ĉeestantoj : Carl Deseure, Patrick Haerick, Willem Rasschaert (ne-estrarano), André Ruysschaert, Wim Tytgat, Jean Pierre VandenDaele.
senkulpigis : Katrien Batsleer, Mari-Roza De Wolf, Françoise Guldentops, Ilse Jacques.

TAGORDO

1. Enkonduko :
Gvidanto : André Ruysschaert.
Protokolanto : Jean Pierre VandenDaele.

Trarigardo de la antaua protokolo :
- Wim intertempe pagis al FEL la fakturon pri libroj nerevenintaj de la europaj festoj en Bruselo.
- Patrick ne jam ricevis la aliĝmonon el Germanio. La komisio por la libroservo preskau kovras la kostojn de la insignoj.
- Ite donos al André la subskribitan kontrakton rilate al la interŝanĝado jugoslava. Li ankau ne jam ricevis respondon al la demando ĉu la interŝanĝado ankau eblos dum la IJK en Zagrebo. Plej verŝajne tio ne eblos. La interŝanĝa kontrakto pola intertempe finiĝis. Reintertraktado okazos ek de kiam estiĝos interesiĝo de FLEJA-membroj por iri al Pollando.
- rememoriga letero estis sendita al FLEJA-anoj kaj legintoj de Koncize dum la jaro '87 cele al realiĝo.
- dum '87 ni havis ĝeneralan jarkunvenon dum la semajno de internacia amikeco en Leuven kaj estrarkunsidoj je 23/5 kaj 20/12 en Gento, je 26/9 en Antverpeno kaj dum la 10a FLEJA-semajnfino.

2. Financoj (Wim) :
Wim prezentis la bilancon de la antauaj du jaroj klarigante ke la finkalkulo de la jaro 86a finiĝas fine de februaro '87 kaj ke ek de '87 ĝi saldas en la lasta tago de decembro. Tiel la finkalkulo de '86 havas rezulton gajnan de 15170 BEF kaj tiu de '87 malgajnon de proksimume 20000 BEF. Tio pro malpliiĝo de kotizoj. Ek de '88 la BAC-konto iĝos konto ĉe KB-Mortsel nome de FLEJA kun rajtiĝitoj Wim kaj André. La financo situacio de la diversaj kontoj pritraktiĝos dum iu sekvonta estrarkunveno. La financaj raportoj de ambau jaroj estis unuanime akceptitaj. Carl serĉos revizoron.

3. JEN/Koncize (Patrick/Wim)
JEN:
Patrick havas la impreson ke NEJ volas sole daŭrigi la eldonon de tiu ĉi revuo sen la helpo de flandroj. Se estas tiel tiam ni intertraktos kun FEL por havigi aldonan paĝon en Esperanto-Panorama.
Koncize:
Wim nur ricevis fakturojn de Koncize ĝis la unua numero de '87 ! Li ne scias ĉu li ricevos pliajn. Kiel la antaua jaro novaj FLEJA-anoj ricevas senpage Koncize dum tiu ĉi jaro.



4. 11a semajnfino (Patrick)

Li ne jam trovis taŭgan lokon kie eblas ricevi manĝaĵojn. Li plu esploros pri ejo sen au kun manĝaĵriceveblecо. Carl esploros pri havigo de varmaj manĝaĵoj, tiel ke nur serĉendas iu por la nevarmaj manĝaĵoj. Tiel estas antauvidata jena elspezo po partoprenanto : maks. 300 BEF por la domo, maks. 200 BEF por la manĝaĵoj malvarmaj kaj maks. 500 BEF por la manĝaĵoj varmaj. Programkosto estu maksimume 15000 BEF.

5. Elektoj
Kiel kutime neniu sin antaue anoncis kandidaton estraran. Tiel nur eblis formi estraron el la supre menciitaj ĉeestantoj lau jena aspekto.
…raro:
…zidanto: André Ruysschaert
Ganzestraat 89 8000 Brugge, tel. 050/341469.
Kasisto: Wim Tytgat
A. Segerslei 108/2 2510 Mortsel, tel. 03/4405904.
sekretario, /GCA, PS: Jean Pierre VandenDaele
V. de Saedeleerpad 3 8380 Lissewege, tel. 050/546249.
kongresoj, redaktoro JEN/Koncize: Patrick Haerick
M. Verdoncklaan 77 9219 Gentbrugge, tel. 091/305120.
administranto:rilatoj kun fel Carl Deseure
Sint-Stefaanstraat 102 1940 Zaventem, tel. 02/7202009.
Willem Rasschaert bedaurinde transpasis la aĝlimon.
TEJO-komitatanoj: André Ruysschaert kaj Ilse Jacques (se ŝi kandidatiĝos kaj se FLEJA akiros pli ol 100 membroj antau la IJK).
Fine de februaro FLEJA havis 88 membrojn (de kiuj 4 estas donacantoj kaj 3 dumvivaj). La nuna estrara situacio estos ŝanĝita en la ŝtatgazeto, tiel Wim redaktos leteron subskribendan de ĉiuj estraranoj , poste senditan al la koncerna redakcio.

6. Estonteco
Finfine la estraro konsciiĝas ke io estas farenda rilate al ilia postservo. Monrimedo haveblas, homrimedo tamen malpli. Kio ajn ni planos havi surlokajn aktivecojn en kunlaboro kun la lokaj grupoj por prezenti nian asocion. Precipe nun estas junaj kursanoj en Brugge, Kortrijk, Leuven kaj Oostende.
Patrick kontaktos la grupo en Kortrijk por aranĝi la ejon.
Informcele ni ankau mendos duonhoran vidbendan filmon pri la IJK-…grebo kun kvinminuta aldono de la tieaj flandraj partoprenantoj.
… ĝi kostas 200 guldenojn.

7. Diversaĵoj
Eurotejo :
Eurotejo estas plano de TEJO por establi tegmentan junularan asocion por la junularaj asocioj esperantistaj de la landoj en la europa konsilio: por havigi du kunlaborantoj salajritaj en la europa kunordiga buroo (ECB). Tamen la kondiĉo (pruvo de 5000 membroj en Belgio) ne estas realigebla kaj ni dubas ĉu entute Eurotejo estas realigebla afero.

Lingvokursoj de la europa komunumo
Regule EK okazigas lingvokursojn. Informojn pri tio aperos en JEN.

Interkongreso IJK-UK '89

NEJ organizos la IJK en nederlanda limburgo. Car la UK okazos en Britio, ili petis al FLEJA, ĉu ni pretas organizi interkongreson itinere al Britio. Ni ne tuj pensas tio realigebla, precipe ĉar dum tiu ĉi periodo junulardomoj estos plenplenaj kaj pli multe kostaj. Kaj ĉar ni preferas la marbordon, Patrick informos ĉe la loka Esperanto-grupo de Oostende pri eblaj ejoj.

Serĉpromenado en Gento
Por altiri junaj FLEJA-membroj al tiu ĉi arango ni disponos premian kasedon rokmuzikan au bildlibron por la unuaklasifikita junulo. Antaŭ tiu ĉi serĉpromeno okazonta je la 28an de majo ni havos malferman estrarkunsidon ĉe Patrick je la 10a horo.

Fino: 12h45

Uzitaj mallongigoj

| | |
|---|---|
| FLEJA | Flandra Esperantista Junulara Asocio |
| GCA | Grafika Centro de Antverpeno |
| IJK | Internacia Junulara Kongreso |
| JEN | Jongeren Esperantonieuws |
| TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Asocio |
| UK | Universala Kongreso |
| PS | Pasporta Servo |

NOVA ORGANIGRAMO DE FEL

Meze de majo aperos, same kiel pasintjare, la nova organigramo de FEL, kiu enhavos la adresojn kaj telefonnumerojn de ĉiuj aktivuloj de Flandra Esperanto-Ligo kaj de ties grupoj.
Ni petas al la respondeculoj de la grupoj kontroli en „Informilo" de majo 1987 ĉu la tieaj donitaĵoj ankoraŭ estas ĝustaj, kaj, se ne, averti la Centran Oficejon de FEL pri tio antaŭ la 10a de majo.

„KARULO MI AMAS VIN" iĝas „ŜANCO POR FELIĈO"


La estraro de Movado sen Nomo avertas nin, ke la titolo de ĝia baldaŭ eldonota libro de Phil Bosmans ŝanĝiĝis. Ĝi ne estos „Karulo mi amas vin" kiel antaŭe anoncite, sed „Ŝanco por feliĉo". Temas pri lingve kaj aspekte tre bona traduko de la sukcesverko „Menslief ik hou van jou". Interesitoj povas nun jam mendi ĝin ĉe FEL. Membroj de FEL ricevas aŭtomate rabaton de 10%. Pluvendistoj ricevas makleron de 16,6% ekde tri ekzempleroj, 33% ekde 10 ekzempleroj.



MEMBROSTATISTIKO

| Grupo | en 1985 | en 1986 | en 1987 |
|---|---|---|---|
| Aalst | 41 | 43 | 62 |
| Antwerpen | 139 | 140 | 149 |
| Brugge | 35 | 41 | 45 |
| Brussel | 22 | 35 | 39 |
| Gent | 19 | 36 | 47 |
| Halle | - | - | 10 |
| Kalmthout | 32 | 38 | 34 |
| Knokke | 7 | 5 | 4 |
| Kortrijk | 32 | 39 | 74 |
| Leuven | 55 | 60 | 66 |
| Limburg | 47 | 47 | 91 |
| Mechelen | 7 | 17 | 18 |
| Mortsel | 22 | 20 | 21 |
| Oostende | - | - | 1 |
| St.-Niklaas | 3 | 3 | 4 |
| Wilrijk | 3 | 3 | - |

# Via MONATO-memorigilo



## senpage por vi

se vi abonas
**MONATOn**
ĝis la fino de marto!

**Reagu tuj!**

Tiu ĉi memorigilo enhavas notlibreton, adres- kaj telefonaron kaj orkoloran skribilon. Ekstere ĝi havas la surpreson "Esperanto" kaj la jubilean simbolon. Ĝin vi ricevos **senpage** se vi ĝis nun ne estis abonanto de **MONATO** kaj nun abonos ĝin antaŭ la fino de marto.
**MONATO** estas magazino internacia sendependa pri aktualaĵoj, kulturo, politiko, sporto, turismo, ktp. Ĝi aperas 12 fojojn jare kaj enhavas 32 paĝojn, duoble tiel grandajn kiel tiaj de *"Esperanto Panorama"*. Abonu **MONATOn** prove dum unu jaro kontraŭ nur 1095 belgaj frankoj!
Pagojn vi bonvolu direkti al la poŝtĉekkonto de Flandra Esperanto-Ligo, 000-0265338-43, Bruselo.

P.S. Via senpaga donaco nun jam kuŝas preta, sed ne forgesu mendi ĝin antaŭ la fino de marto!